


# HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



Ĉu ni rajtas senti nostalgion?

1  
----- 60-a jarkolekto  
2016



## HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado  
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

\*

## MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok  
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

## ENHAVTABELO:

2. I. Gulyás: Estrarelekto
3. I. Gulyás: La agadoj de la hungaraj  
fervojistaj esperantistoj
8. J. Halász: Interligo de fervojaj  
sistemoj
14. J. Tomísek: El fervoja mondo
16. J. Horváth: Rava fabelo
18. J. Halász: Rememoro pri morto de  
Kalocsay
19. J. Halász: Zamenhof-memorifesto en  
Nyíregyháza

60-a jaro N-ro 1. JANUARO-MARTO

## ESTRARELEKTO

Pri kio mi povas mediti en la komenco de la jaro? Pri la antaŭjaraj agadoj kaj rezultoj mi jam detale skribis en la ĉefartikolo, ankaŭ mi skemis la taskojn en la kuranta jaro. Tamen kelkajn pensojn kaj opiniojn pri nia estrarelekto mi povas koncepti. Tiu estas grava temo, ĉar nia statuto preskribas la estrarelekton po kvar jaroj. Intertempe en la pasinta jaro eksterordinare ni devis ekzameni la nombron de la estraranoj, ja du estraranoj el la kvin demisiis pro gravaj malsanoj. Ankaŭ anoncis du estraranoj, ke ili ĝis la nuna jaro – kiam devas fari estrarelekton laŭstatute - entreprenas la estraran postenon. La 2015-jara ĝenerala kunsido establis komisionon por serĉi novajn kandidatojn por estraraj postenoj. La fortostreĉo por trovi taŭgajn hungarajn fervojistajn esperantistojn estis vana.

Kaŭze de la pluan kontinuan funkciadon de la estraro de nia asocio, la ĝisnuna trimembra estraro entreprenis daŭrigi la agadon por la sekvaj kvar jaroj, respektive ĝis tiam niaj sanstatoj kaj aliaj cirkonstancoj permesos al ni. Estis sama situacio ĉe la trimembra Kontrola Komisiono. Al tiu laboro la estraranoj, la membroj de la Kontrola Komisiono, eĉ la redaktoro de HFM bezonas plurajn helpojn kaj subtenojn de la membraro de nia asocio. Se iu entreprenas iun taskon, plenumu tion bonkvalite post iom da tempo. Ĉiuj membroj klopodu partopreni en la agado de nia asocio, de HEA, IFEF kaj UEA, eĉ de aliaj organizaĵoj, por ke la esperanto-movado ankaŭ pere de nia laboro montru la unuecan kunlaboron por la nobla celo. Al tiu agado mi deziras al ĉiuj hungaraj fervojistaj esperantistoj bonan sanon, bonvolon kaj entuziasmon.

István Gulyás

# LA AGADOJ DE LA HUNGARAJ FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ

En la komenco de la jaro ni ĉiam taksas la antaŭjarajn laborojn de la hungaraj fervojistaj esperantistoj, la rezultojn kaj malfacilaĵojn, la ĝojajn kaj malĝojajn eventojn. Ankaŭ rilate al la jarŝanĝo ni formulas la plej gravajn taskojn, la atendeblajn eventojn por la nova jaro.



*La prezidanto salutas la partoprenantojn de la ĝenerala kunsido*

Malfacila jaro estas malantaŭ ni. La malcerta financa stato, morto de kelkaj eminentaj hungaraj fervojistaj esperantistoj, denova translokiĝo de nia asocio, kaj aliaj homaj kaj asociaj problemoj kaŭzis zorgojn ĉe ni.

Dum la ĝenerala kunsido de nia asocio – okazinta la 5-an de marto 2016 – la deputitoj de la fakgrupoj (Budapest, Győr, Szombathely, Zalaegerszeg, Pécs, Kiskunhalas-Kelebia), kaj la membroasocioj (Tata,

Miskolc, Nyíregyháza) partoprenis, escepte la fakgrupoj Pécs kaj Zalaegerszeg pro sanproblemoj de la deputitoj. Bedaŭrinde kiam ni organizis kaj anoncis la kunsidon ni ne sciis, ke la 5-a de marto estas eksterordinara labortago. Pro tio kelkaj invititaj personoj (ekz. estraranoj de HEA) ne povis partopreni en tio.

Unue la prezidanto de la asocio salutis la ĉeestantojn, kaj la partoprenantoj rememoris pri tiuj membroj de nia asocio, kiuj mortis en la pasinta jaro:

**János Patay**, Honora Membro de IFEF, kaj membro de la Redaktora Komisiono de IFEF, iama sekretario de nia asocio, kaj redaktoro de nia faka revuo HFM,

**D-ro Ferenc Phersy**, iama gvidanto de la Fakgrupo Budapest, kaj komitatano „A” de IFEF ĉe UEA,

**Imre Gyimesi**, dumviva membro de nia asocio.

La prezidanto ankaŭ rememoris pri **D-ro István Bácskai** – fondinto kaj prezidanto de nia asocio, fondinto kaj ĉefredaktoro de nia faka revuo Hungara Fervojista Mondo, honora membro de Internacia Fervojista Esperanto Federacio (IFEF), tiu de Hungaria Esperanto Asocio (HEA) kaj same de Universala Esperanto Asocio (UEA), distingito de FISAIC per ora medalo kaj posedanto de multaj aliaj fakaj kaj laboraj distingoj – kiu antaŭ dudek jaroj mortis.

La sekretario de nia asocio raportis pri la 2015-jara agado. La raporto enhavis la indikojn de la membronombro, taksis la plenumitajn taskojn kaj difinis la nunjarajn

agadojn. Laŭ tio la asocio havas 475 membrojn, inter ili 133 aktivajn membrojn, 95 pensiulojn kaj 247 protektantajn membrojn. Tiuj ciferoj enhavas la membronombrojn de la tri membroasocioj, kaj ni povis konstati, ke la membronombro estas la plej granda en la kadro de IFEF, eĉ ankaŭ en la Hungaria Esperanto-Asocio. El la membraro estas 15 IFEF-membroj, 6 fakdelegitoj, 5 dumvivaj membroj kaj 6 individuaj membroj de UEA. La raporto konstatis, ke – malgraŭ la malforta financa situacio, kaj aliaj malbonaj cirkonstancoj – niaj fakgrupoj kaj membroasocioj plenumis la entreprenitajn taskojn, kaj nia asocio agadis laŭ la laborplano, kaj helpe de la klubkunvenoj mobilizis la tutan membraron. Dum la ĝenerala kunsido okazis estrarelekto. La deputitoj reelektis la ĝisnunajn estraranojn, kiuj – analize la nunan situacion – denove entreprenis daŭrigi la estrarajn kaj kontrolajn taskojn por la sekvaj kvar jaroj. Laŭ tio la estraranoj estas:

**István Gulyás** prezidanto kaj redaktoro,  
**D-ro József Bacsárdi** sekretario,  
**D-ro József Halász** kasisto ( respondeculo pri ekonomio).

La membroj de la Kontrola Komitato estas:

**D-ro Imre Ferenczy** gvidanto,  
**István Sutka** membro,  
**Miklós Zuberecz** membro.

La rezulto de la elektoj signifas, ke nia asocio laŭleĝe povas plu agadi, kaj la nian fakan revuon HFM ni povas plu aperadi seninterrompe ekde 1957.



*Partoprenantoj de la ĝenerala kunsido*

En la ĝenerala kunsido la prezidanto informis la partoprenantojn pri la situacio de la landa kaj internacia Esperantomovado. En tiu kadro iomete detale konigis la opinion pri la Hungaria Esperanto-Asocio, pri la Universala Esperanto-Asocio kaj pri la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio. Li akcentis la pozitivan efikon de la agadplano de IFEF, la laboron de la tri Komisionoj kaj de la establitaj sep

Laborgrupoj. La ĝenerala kunsido unuanime akceptis la raportojn pri la efektivigo de la 2015-jara buĝeto, la raporton de la Kontrola Komitato.

Fine la kunsido aprobis la 2016-jaran buĝeton kaj laborplanon.

La prezidanto detale konigis la deputitojn pri la denova translokiĝo de nia centra oficejo el la „Városligeti Fasor” al la nova rezidejo „MÁV Széchenyi István Kultúrház” en Istvántelek. En la kulturdomo sukcesis ricevi belan kaj sufiĉe grandan oficejon, eĉ apartan bibliotekon por niaj pr. dumil volumaj libroj kaj periodaĵoj. Por certigi oficejon kaj mem la translokiĝon grave helpis al ni la Fervojistaj Kultura kaj Libertempa Asocio (VOKE), eĉ ankaŭ kelkaj membroj de nia asocio helpis ordigi kaj aranĝi la tutan materialon. Mi dankas al ĉiuj helpantoj la temporabajn laborojn, kaj mi ege esperas, ke tiu translokiĝo estas la lasta en nia vivo. La ĝenerala kunsido decidis, ke nia asocio ne organizu en la kuranta jaro „Landa Amika Fervojistaj Esperanto-Renkontiĝo”-n. La kaŭzo estas, ke en la najbara lando Slovakio okazos la 101-a

Universala Kongreso de Esperanto, kie multaj hungaraj fervojistaj esperantistoj planas partopreni, kaj la financaj eblecoj ne permesas partopreni en du aranĝaĵoj.

En la jaro 2015 okazis tre multaj Esperanto-eventoj, el kiuj por ni la plej grava



*La sekretario faras raporton*

estis la 67-a IFEF-kongreso, okazinta en la fora lando Ĉinio, en la sudĉina belega urbo Kunming. Partoprenis entute pli ol 200 kongresanoj, el kiuj estis nur 42 eŭropaj fervojistaj esperantistoj. La kongreson komune kun la Ĉina Esperanto-Ligo organizis la Ĉina Fervojistaj Esperanto-Asocio. El Hungario partoprenis tri personoj, el kiuj Márta Pintér entreprenis la komitatan postenon nur por tiu kongreso, kaj ŝi konvene reprezentis nian asocion. Pri tiu kongreso ŝi detale faris raporton en nia revuo HFM.

La 100-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto okazis en la franca urbo Lillo. Tiu kongreso estis la plej grava manifestacio de Esperanto, kiu montris al la mondo la gravecon de nia movado, kaj la signifon de la komuna lingvo. Dum la kongreso okazis multaj oficialaj kunsidoj, altnivelaj kulturaj programoj, interesaj ekskursoj. Okazis ankaŭ fervojista kontaktkunveno, kiun gvidis la nova komitatano „A” de IFEF ĉe UEA, Rodica Todor, nia prezidantino. Okazis ankoraŭ interesa fakekskurso, en kiu multaj fervojistaj kaj nefervojistaj esperantistoj partoprenis. Pri tiu kongreso D-ro József Halász faris interesan raporton en HFM.

La 47-a Landa Amika Fervojistaj Esperanto-Renkontiĝo okazis en la urbo Tata kun 43 partoprenantoj. Kiel kutime la membroasocio denove organizis tiun renkontiĝon profesie kaj zorgeme. Dum la renkontiĝo okazis multaj interesaj programoj, interalie tuttaga

ekskurso al la fama urbo Esztergom. Tie la partoprenantoj vizitis la Bazilikon kaj ties subpreĝejon, trezorejon, kupolon kaj la imponan navon. Okazis urbovizitado, en kiu kadro la ĉeestantoj vizitis belegajn konstruaĵojn, interesajn stratojn kaj placojn, eĉ okazis urborigardo en la slovaka urbo Šturovo. En la kutima „laborkunsido” nur kelkaj partoprenantoj ĉeestis, tamen estis interesa kaj grava evento de la renkontiĝo.

En la pasinta jaro okazis du estrarkunsidoj de IFEF. La printempa kunsido okazis en la franca urbo Dijon, kiu estis plivastigita kun komitatanoj de kelkaj landaj asocioj de IFEF. Dum la estrarkunsido la partoprenantoj detale traktis la taskojn de la Komisionoj kaj de la sep Laborgrupoj. Grava afero estis la modifo de la Statuto kaj Regularo de IFEF. La alia grava evento estis la partopreno en la kunsido la ĉefsekretariino de FISAIC, kun kiu la pritrakto estis rezultohava. Kompreneble la estraranoj traktis la kutimajn tagordpunktojn, kiel la preparlaboro de la sekva IFK, la kongreslando por la jaro 2017, la agado de la Redaktora Komisiono, reelektado de la ĉefkomitatano kaj anstataŭanto, ktp. La aŭtuna estrarkunsido okazis en pitoreska bulgara urbo Veliko Tarnovo. Bedaŭrinde mi ne povis partopreni en la kunsido pro mia malsano. La estraro traktis pri la sekvaj

IFEF-kongresoj, pri organizaj aferoj, pri la estrarelektado dum la 68-a IFK, pri la financaj aferoj. Gravaj temoj estis la agadoj de la komisionoj (Faka, Redaktora kaj Statutrevizia), la taksado de la agadoj de la sep Laborgrupoj, kaj la eksteraj rilatoj de IFEF.

Resumante la agadojn de IFEF kaj de nia asocio HFEA en la jaro 2015, mi povas



*La prezidanto respondas al la deputitoj dum la ĝenerala kunsido*

konстати, ke okazis malbonaj kaj ankaŭ ĝojaj eventoj. Inter la malbonaj eventoj mi devas menciigi, ke ni perdis kelkajn eminentajn esperantistojn kaj enlande kaj internacie, kio donis al ni korŝirajn eventojn. Ankaŭ estis doloriga okazo la ĉeson de la Norvega Fervojista Esperanto-Asocio. En kelkaj landoj stagnas la movada laboro, kaj en kelkaj landoj sub danĝeran nivelon malkreskis la membronombro de IFEF. En la 2000-aj jaroj la nombro de la IFEF-anoj estis pli ol mil, en la pasinta jaro 313 kune kun la individuaj membroj. Mi rimarkas, ke ĝenerale mankas gejunuloj, kaj mankas kapablaj gvidantoj, kiuj povus transpreni la gvidajn taskojn. Ni ne sukcesis haltigi la maljuniĝon de la fervojista Esperanto-movado, kaj tion montras la ĉeson de multaj landaj asocioj. Post la ĉeso de brita, finnlanda, sveda, nederlanda, estona, svisa asocioj, nun jam ĉesis la landa asocio de Serbio, Slovakio kaj Norvegio. Eĉ Hispanio havas nur 5 membrojn, Danio, Kroatio kaj Slovenio 10-10 membrojn. Tiuj ciferoj atentigas nin pri la ne tro rozkolora estonto.

Inter la ĝojplenaj eventoj mi mencias la kongresojn (ĉefe la centan UK-n, kaj la 87-an IFK-n), la aliajn renkontiĝojn kaj kunvenojn, kie multaj fervojistaj esperantistoj partoprenis. Ankaŭ mi mencias tiun fortostreĉon, kiun la estraro de IFEF faris kun la establo de la Ŝtatutrevizia Komisiono kaj la sep Laborgrupoj, kiuj agadas sur la tutaj terenoj de la movada laboro. Ekzistas inter ni multaj entuziasmaj esperantistoj, kiuj – malgraŭ la problemoj – senlace agadas en la movado. Tiujn fervojistajn esperantistojn ni devas apreci kaj estimi. Ankaŭ estis ĝojplena evento la efektivigo de la taskoj laŭ la laborplanoj de IFEF kaj de nia asocio, eĉ la regula eldonado la revuojn „Internacia Fervojisto” (IF) kaj la „Hungara Fervojista Mondo” (HFM). Mi ankoraŭ povus vicigi la malfavorajn kaj la esperigajn faktojn, sed mi pensas, ke la plej gravajn okazadojn kaj eventojn – rilate al la pasinta jaro – mi menciis.

Alvenis la jaro 2016, kaj mi denove esperas, ke ĉi tiu jaro kunportas bonajn rezultojn al la fervojista Esperanto-movado, eĉ por la ĉiutaga vivo. En la kuranta jaro denove okazos gravajn eventojn, kiel la 68-a IFEF-kongreso, okazonta en bulgara apudmara urbo Varna en la mezo de majo, la alia estas la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en la slovakaj urbo Nitra en la fino de julio.

Dum la 68-a IFK okazos estrarelektado, kiu grave determinos la laboron de IFEF. La bulgaraj fervojistaj esperantistoj jam kvinfoje organizas IFEF-kongreson, multajn landajn fervojistajn kongresojn, estrarkunsidojn, staĝojn por lingvokursoj ktp, do ili havas spertojn por altnivele organizi nian 68-an kongreson. Laŭ la kongresa programo ni havas multajn fakajn programojn, kunsidojn, belegajn tuttagajn kaj duontagajn ekskursojn, kaj interesajn kulturajn spektaklojn. Bedaŭrinde ĝis nun aliĝis malmulte da fervojistaj esperantistoj al la kongreso pro la malstabla internacia situacio, sed mi esperas tamen estos sukcesa kongreso.

La 101-a Universala kongreso de Esperanto okazos en la najbara lando Slovakio en la urbo Nitra. Pro la malgranda distanco, multaj hungaraj esperantistoj partoprenos, inter ili el nia asocio. La kongresa programo estas varia kaj interesa, kaj mi esperas, ke ankaŭ tiu kongreso estos bona propagando de Esperanto. Mi proponas partopreni tiun kongreson, ĉefe dum la kontaktkunveno por fervojistoj.

La printempa estrarkunsido de IFEF jam okazis en la fino de februaro en la franca urbo Colmar. En tiu urbo okazos la 69-a IFEF-kongreso en la jaro 2017. Mi ne partoprenis dum la kunsido pro sanproblemoj, sed mi ricevis detalan sciigon pri la traktado kaj la rezulto de la kunsido. Laŭ tio la estraranoj pritraktis la ĝisnunan situacion de la preparlaboro de la 68-a IFK, la organizajn kaj financajn aferojn. Ili ankoraŭfoje ekzamenis la situacion kaj la estontecon de IFEF. Longa tempo estis dediĉita al la 69-a IFEF-kongreso, pri kiu preparlaboro detale raportis la lokaj esperantistoj.

La aprobita laborplano de nia asocio por 2016 enhavas multajn taskojn, solvendajn problemojn. En la laborplano estas nur kelkaj novaj taskoj, ĉar la agado de la fervojista Esperanto-movado bezonas kontinuan kaj daŭran aktivecojn. Tiuj novaj taskoj estas la severa mastrumado, la plibonigo de la kunlaboro kun VOKE ĉefe sur la financaj terenoj, pli bone atenti kaj helpi la agadon de la Hungaria Esperanto-Asocio, pretigi altnivelajn artikolojn por nia faka revuo HFM.

Ŝajnas al mi, ke niaj membroj kaj en la kadro de la fakgrupoj kaj de membroasocioj povas seninterrompe kaj altnivele, eĉ entuziasme agadi, kaj nia asocio povas doni ekzemplon al la landaj asocioj de IFEF kaj aliaj Esperanto-Societoj pri la rezultohava laboro.

**István Gulyás**

# INTERLIGO DE FERVOJAJ SISTEMOJ

(unua parto)


*Pri tiu temo D-ro József Halász faris prezentadon en la “Inĝeniera Ĉambro”, kaj la redaktoro de HFM tiel taksas la temon, ke la prezentadon aperigu en nia faka revuo. Multaj fervojistaj fakuloj interesas pri tiu interesa temo. Por ke ili klarvidu la preskribojn de la Eŭropa Unio pri la fervojoj, kaj komprenu la fervojajn sistemojn en EU ni aperigas tiun tutan prezentadon. Tiu teksto estas iomete longa, pro tio ni aperigas tiun en tri daŭrigo.*

## 1. ENKONDUKO

Eŭropa Unio estas komunumo de 28 landoj. La fundamenta principo de ilia komuna agado estas la konstitucia ŝtateco. La kunagado okazas laŭ kontraktoj akceptitaj reciproke, demokrate kaj memvole. La ĉefa motoro de Eŭropa Unio estas la unueca, alinome la interna merkato. Ene de Eŭropa Unio estas fundamenta rajto la libera fluo de varoj, kapitalo kaj servoj, respektive la libera movo de personoj. Ĉi-lasto ne povus efektiviĝi sen trafiko – kaj ene de ĝi – sen la fervojoj. La fervojoj la taskojn pretenditajn de ili nur tiukaze kapablos plenumi bone, se en tio la malsamaj reguloj de la membroŝtatoj ne malhelpos ilin. Se iu trajno ekveturas de bordo de Atlantika Oceano tiu tiel devas atingi tra landlimoj la plej orientan punkton de Eŭropa Unio, ke dumvoje en la unuopaj membroŝtatoj nek teĥnikaj, nek ekspluataj diferencoj kaŭzu perturbojn. Ekzemple la lokomotivestro dumvoje ĉie renkontiĝu kun sama signaladsistemo. Do, por Eŭropa Unio iĝis grava tasko interligi kaj unuecigi la fervojajn sistemojn.

## 2. STRUKTURO KAJ AGADO DE EŬROPA UNIO

Ni pensas estas utile trarigardi mallonge la strukturon kaj agadon de Eŭropa Unio el tiu vidpunkto, kiuj organizaĵoj okupiĝas pri la trafiko kaj ene de ĝi pri demandoj de la fervojo.



Bildo 1. Strukturo de Eŭropa Unio

## 2.1 EŬROPA KONSILANTARO

Eŭropa Konsilantaro estas programdona institucio de EU, kiu difinas direktivojn kaj politikajn prioritatojn de EU. Partoprenantoj de ĝiaj kunsidoj estas ŝtatestroj de EU, prezidentoj de Konsilantaro de EU kaj Eŭropa Parlamento. La kunsidojn partoprenas ankaŭ Alta Reprezentanto por la komuna ekstera kaj sekureca politiko de la Unio. Laboron de la Eŭropa Konsilantaro kunordigas ĝia prezidento. La nuna prezidento estas **Donald Tusk** eksĉefministro de Pollando. Prezidento de Eŭropa Konsilantaro kune kun prezidento de Eŭropa Komisiono plenumas plej altnivelan reprezentadon de EU.

## 2.2 EŬROPA PARLAMENTO

Eŭropa Parlamento estas sola organizaĵo de EU, elektita senpere. La civitanoj en 28 membroŝtatoj de EU havantaj balotrajton, elektas 751 reprezentantojn por kvinjara oficperiodo, je la nomo de 500 milionoj civitanoj de EU.

### 2.2.1 Kompetentecoj:

*La Eŭropa Parlamento:*

- partoprenas la procezon de kreado de unia juro; en multaj kazoj ĝi eĉ havas la rajton forĵeti proponojn anoncintajn de la Eŭropa Komisiono;
- partoprenas preparadon de budĝeto; ĝi havas la decidan voĉon pri nedevigaj elspezoj kiu estas ĉirkaŭ 25% de eŭropunia budĝeto;
- kontrolas, ĉefe la Eŭropan Komisionon al kiu ĝi povas prezenti malfidon; ĝi kontrolas ankaŭ plenumadon de la budĝeto kaj (mal)akceptas agadon pri ĝia realigo de la Komisiono;
- elektas la Eŭropan Ombudsmanon.
- estas en kontakto kun la naciaj parlamentoj

*Agado de la Parlamento*

Agado de la parlamento estas dividebla je du partoj.

- preparo de juraj normoj kiu ligiĝas al komisionoj. Ene de la Eŭropa Parlamento estas 20 komisionoj, kaj 2 subkomisionoj. Ĉiu el ili okupiĝas pri iu faktereno. La komisionoj ekzamenas la proponojn pri juraj normoj, kiujn pridiskutas ankaŭ grupoj de la deputitoj. La deputitoj kaj grupoj de la deputitoj rajtas proponi modifaĵojn, aŭ malaprobi la proponojn.
- akcepto de juraj normoj okazas en la plenkunsido. Ĉiuj deputitoj aperas en la kunsida salono partopreni la baloton decidantan pri sorto de la prezentitaj proponoj. La plenkunsidoj okazas dum kvar tagoj ĉiumonate.

### 2.2.3 La konstantaj komisionoj de Eŭropa Parlamento:

- Eksteraj aferoj - AFET
- Homaj rajtoj – DROI

- Sekureco kaj defendopolitiko – SEDE
- Evoluigo – DEVE
- Internacia komerco – INTA
- Buĝeto – BUDG
- Kontrolo de buĝeto – CONT
- Ekonomiaj kaj financaj aferoj – ECON
- Dungitecaj kaj socialaj aferoj – EMPL
- Medioprotektado, sanitaro, kaj nutraĵsekureco - ENVI
- Industrio, esplorado kaj energio – ITRE
- Interna merkato kaj konsumanto-protektado – IMCO
- **Trafiko kaj turismo – TRAN**
- Regiona evoluigo – REGI
- Agrokulturo kaj provinca evoluigo – AGRI
- Fiŝado - PECH
- Kulturo kaj instruado – CULT
- Juraj aferoj – JURI
- Civitanaj rajtoj, internaj kaj justicaj aferoj – LIBE
- Konstituciaj aferoj – AFCE
- Rajtoj de virinoj kaj ŝancoegaleco – FEMM
- Peticioj - PETI

#### 2.2.4 Kompetentecoj de Komisiono pri Trafiko kaj Turismo

Ellabori komunan politikon pri fervoja, ŝosea, aera trafiko kaj pri enlanda kaj mara navigado, precipe inter ili:

- a) komunaj trafikreguloj uzendaj en Eŭropa Unio
  - b) estigi kaj evoluigi transeŭropajn transportajn retojn en branĉo de trafika infrastrukturo
  - c) trafikaj servoj kaj interrilatoj kun triaj landoj
  - d) trafiksekureco
  - e) interrilatoj kun internaciaj trafikaj organizaĵoj
  - f) Eŭropa Marsekureca Agentejo, **Eŭropa Fervoja Agentejo**, Eŭropa Aviadsekureca Agentejo kaj komuna entrepreno SESAR (temas pri „Unueca Eŭropa Ĉielo” novgeneracia aertrafika servosistemo)
- Poŝto  
Turismo

#### 2.2.5 Eŭropa Fervoja Agentejo (ERA)

La Agentejo estis fondita laŭ dekreto de Eŭropaj Parlamento kaj Konsilantaro n-ro 881/2004 EC, kaj funkcias ekde la 1-a de julio 2004. Ĝia sidejo troviĝas en la franca urbo Valenciennes, kaj okazejo de internaciaj konferencoj, renkontiĝoj estas *Lille*.

Ĉefaj taskoj de la Eŭropa Fervoja Agentejo estas:

- pliigi la sekurecon de la Eŭropa fervoja sistemo
- plibonigi la interligon de fervojaj sistemoj
- krei Eŭropan sistemon kiu servas atesti la veturilriparejojn
- helpi la estigon de unueca sistemo por eduki kaj agnoski la lokomotivestojn



Bildo 2. Strukturo de Eŭropa Fervoja Agentejo

### 2.2.5.1 Kompetentecoj de la unuopaj organizaj unuoj

#### *Sekureca teamo:*

- Sekurecdirektado (risikoanalizo, observo, atento, kvalifiki sistemojn de sekurecdirektado, kaj riparejojn, prihomaj taskoj)
- Inspektado kaj ekzameno (komunaj sekurecaj metodoj por ekzamenoj pri konveneco kaj por inspektado; akordigi la funkciadon de ekzamenaj organizaĵoj)
- Reguliga kaj sekurecobserva sektoro (publikaĵo, prijuĝo de la naciaj sekurecaj reguloj)

#### *Teamo por interligo de fervojaj sistemoj:*

- Ellaborado de TSI-oj, kaj manaĝado de iliaj ŝanĝoj
- Akordigi la agadojn de aliaj organizaĵoj koncernitaj la ellaboradon de TSI-oj (normigaj organizaĵoj, notitaj organiaĵoj, naciaj instancoj)
- Ellabori registraĵojn

#### *Ekonomia analizado:*


La celo de ĉi tiu teamo estas eviti malpliigon de konkurkapablo de la fervoja transporto kiun povas kaŭzi reguligo de EU. Tiucele oni pretigas taksadojn pri efikoj de proponoj de la Agentejo por la deciduloj.

#### *ERTMS – Unueca Eŭropa Fervoja Sistemo por Trafikdirektado:*

Rigardante ĝian bazan funkcion temas pri trajninflua sistemo.

Ene de ERTMS ni povas paroli pri tri terenoj:

- trafikdirektado,
- trafiksekureco,
- komunikado.



Bildo 3. Struktura skemo de teamo ERTMS

Gravaj ecoj de ERTMS:

- granda fidindeco kaj sekura funkciado
- la rapido kaj kapacito de la fervojlinio estas pliiĝebla
- profitiga funkciado
- dimensio de la infrastrukturo estas malpliiĝebla
- la radiokomunikado okazas laŭ sistemo GSM

*Reciproka akceptado:*

La tasko de ĉi tiu teamo estas ellabori komunan alproksimigan metodon por prijuĝi kaj interpreti la postulojn kaj metodojn aplikatajn de unuopaj instancoj al enservigo de la fervojaj veturiloj kaj subsistemoj apartenantaj al ili. La celo estas malpliigi la nombron de tiuj samaj ekzamenoj kaj procedoj de permeso farataj pluroble paralele en la unuopaj membroŝtatoj. Pri tiuj reguloj kaj ekzamenoj oni igas rekonebla la konformecon unu al la alia.

## 2.3 KONSILANTARO DE EU

La Konsilantaro – laŭ pli konata nomo Konsilantaro de EU aŭ Konsilantaro de Ministroj – estas unu el la gravaj decidofarantaj institucioj de EU. Ministroj de la membroŝtatoj renkontiĝas enkadre de la Konsilantaro diskuti pri uniaj juraj normoj kaj akcepti ilin, kunordigi la membroŝtatajn ekonomiajn politikojn, formi aliajn fakterenojn – ekzemple la komunan eksteran kaj sekurecan politikon de EU – veni al internaciaj interkonsentoj kaj akcepti la EU-buĝeton. Taskojn de prezidento de la Konsilantaro plenumas alterne la 28 membroŝtatoj de EU dum sesmonataj periodoj.

Depende de la ĵus diskutata afero la Konsilantaro kunsidas en diversaj konsistoj en tn. formacioj.

La Konsilantaro estas konsiderata sola jura persono, sed depende de la tagordaj temoj ĝi kunsidas en 10 diversaj formacioj

### 2.3.1 Formacioj de la Konsilantaro

Konsilantaro de Ĝeneralaj Aferoj

Konsilantaro de Eksteraj Aferoj

Konsilantaro de Ekonomiaj kaj Financaj Aferoj (inkluzive ankaŭ la buĝeton)

Konsilantaro de Internaj kaj Justicaj Aferoj (inkluzive ankaŭ la civilan protektadon)

Konsilantaro de Dungiteco, Socialpolitiko, Sanitaro, kaj Konsumanto-protektado

Konsilantaro de Konkurskapableco (Interna merkato, industrio, esploro kaj spacpolitiko)

#### **Konsilantaro de Trafiko, Telekomuniko kaj Energio-afero**

Konsilantaro de Agrikulturo kaj Fiŝado

Konsilantaro de Medioprotektado

Konsilantaro de Instruado, Junularaj, Kulturaj kaj Sportaj Aferoj (inkluzive ankaŭ la aŭdovidajn aferojn)

### 2.3.2 Kompetentecoj de Konsilantaro de Trafiko, Telekomuniko kaj Energio-afero

Tasko de la Konsilantaro sur tereno de la trafiko estas – kune kun la Parlamento – akcepti la jurajn normojn apartenanatajn al kadroj de la trafikpolitiko, ekzemple tiel komunajn regulojn de la internacia transporto, kondiĉojn koncerne la transportistojn, fari disponojn pri rajtoj de la pasaĝeroj kaj pri plibonigo de la trafiksekureco. Unu el la plej gravaj klopodoj de la Konsilantaro estas formi tiujn funkciigeblajn trafikajn sistemojn, kiuj certigas pli grandan moveblecon por la uzantoj – laŭ konvenaj trafikaj tempodaŭro kaj vojlinio – kun malgranda energikonsumado.

## 2.4 EŬROPA KOMISIONO

Eŭropa Komisiono estas decidoprepara, efektiva, decidofaranta kaj reprezentanta organo de EU. Krom la Eŭropa Parlamento kaj Konsilantaro de Eŭropa Unio ĝi estas unu el la tri ĉefaj registaraj institucioj de EU. Ĝia plej grava tasko estas iniciati jurajn normojn, artikoligi ilin, kaj agadi kiel gardanto de tiuj uniaj kontraktoj kiuj signifas la juran bazon de EU.

Ĝi havas tiom da membroj kiom membroŝtato havas EU, ĉiu membroŝtato delegas unu komisionanon en la organizaĵon. La nuna prezidento de Eŭropa Komisiono estas **Jean-Claude Juncker**, kiu prezidas komisionon konsistantan el 27 aliaj komisionanoj.

La Komisiono konsistas el Ĝeneralaj Direkcioj kaj servoj. Entute funkcias 33 Ĝeneralaj Direkcioj, inter ili troviĝas **Moviĝemo kaj Transporto (MOVE)**

## 2.4.1 Kompetentecoj de Ĝenerala Direkcio Moviĝemo kaj Transporto (MOVE) Sur tereno de la Trafiko:

- Rajtoj de Eŭropaj civitanoj dum siaj vojaĝoj
- Rajtoj de la pasaĝeroj
- Fremdultrafiko
- Trafikpolitiko
- Serva sektoro
- Transeŭropaj transportaj retoj
- Unia kondukrajtigilo
- Pasaĝersekureco

## 2.5. HIERARKIO DE LA JURAJ NORMOJ

- **Dekreto:** La dekreto estas deviga jurfarada akto. En EU la dekretoj estas komplete aplikendaj.
- **Direktivo:** La direktivo estas tiu jurfarada akto, kiu por ĉiuj uniaj landoj determinas la devige akirendan celon. Metodo de la decidofaro estas komisiita al la unuopaj landoj.
- **Decido:** La decido devigas nur siajn adresitojn kaj ĝi estas senpere aplikenda. (ekzemple iun membroŝtaton de EU, aŭ iun entreprenon)
- **Propono:** La propono ne estas deviga. La propono ebligas por uniaj institucioj deklari siajn starpunktojn, kaj doni proponojn pri agadstrategio, ne transŝovante iun ajn juran devigon al adresitoj de la propono.
- **Metodaj informiloj:** Iliaj kono kaj aplikado ne estas deviga, tamen estas utila.

D-ro József Halász

( Daŭrigota)

## El fervoja mondo

Aŭstrio: **Transport-entrepreno *Westbahn* pripensas grandan ekspansion**  
La entrepreno *Westbahn*, kiu nun trafikigas en unuhora kadenchoraro pasaĝertrajnojn sur fervojlinio *Wien West -Salzburg*, planas por decembro 2017 pluan ekspansion. Trajnoj trafiku en 30-minuta kadenchoraro el ambaŭ tiuj ĉi stacioj. Ĉiu dua trajno de Vieno pluveturu al *Insbruck*; plilongigon ĝis *Bregenz* oni esploras. Tiucele estos ĉe firmao *Stadler* menditaj unu sesvagona kaj naŭ kvarvagonaj duetaĝaj kombinaĵoj. Ĉi tiuj povus esti aprobitaj ankaŭ por trafiko en Germanio. Kvankam veturiloj por *Westbahn* estas konstituataj por maksimuma rapido 200 km/h, trafikisto promesas, ke ili povas atingi la saman rapidon kiel trajnoj *railjet*.

Aŭstrio: **Projekto *S-Bahn* en *Stirio* allogis milojn da vojaĝantoj**  
Ekde la jaro 2007, kiam komencis realigo de projekto *S-Bahn* en federacia lando *Stirio*, plimultiĝis sur fervojoj en ĉirkaŭaĵo de *Graz* vojaĝantoj je pli ol 50%. La sistemo kunligis oferton de fervojoj *ÖBB* kaj regionaj privataj trafikistoj en unuecan trafikajn koncepton. Parto estas iom-post-ioma modernigo de infrastrukturo, renovigo de veturilaro kaj plimultiĝo de trajnofertoj, kio vidiĝas en malpli longaj intervaloj. La trajnaro *S-Bahn* ĉiutage estas uzata de pli ol 40000 da vojaĝantoj, kaj pluaj 15000 uzas regionajn liniojn en *Stirio*. La plej sukcesa estas linio *S 5 Spielfeld-Strass – Graz* kun centprocenta plikresko en nombro da vojaĝantoj. Ĉiun tagon uzas ĝin 12000 homoj.

Danio: **Trafikisto elektrizos pluajn enlandajn liniojn**

Dana ekspluatanto de fervoja infrastrukturo *Banedanmark* subskribis kun konsorcio de firmaoj *Siemens* kaj *Per Aarsleft* kontrakton por elektrizi 856 km da linioj kun longo pli ol 1300 km ĝis la jaro 2026. Kontaktolineo estos laŭ tipo de linio destinita por rapidoj 160 ĝis 250 km/h. En Danio elektra trakcio komencis esti pli vaste preferata nur fine de 1990-aj jaroj kun malfermo de novaj pontoj kaj tuneloj trans markolojn. En Danio estas instalitaj 1321 km da kontaktlineo sur normalaj fervojlinioj, kaj 435 km sur urbfervojaj linioj en Kopenhago. Entute elektrizita estas nur ĉirkaŭ triono de fervoja reto.

Slovakio: **Fervojstacion en *Žilina* atendas kompleta modernigo**

Slovakaj Fervojoj (*ŽSR*) planas, ekde jaro 2018 modernigi fervojan infrastrukturon en fervoja stacio *Žilina* en kadro de projekto „*ŽSR*, finkonstruado de fervojnodo kaj ranĝstacio *Žilina-Teplička* kaj kunliga infrastrukturo en fervojnodo *Žilina*“. La konstruado daŭros tri jarojn kaj postulas investon 346,7 milionoj da eŭroj laŭ prezoj de jaro 2014. Financadon oni garantios el Operacia programo Integra infrastrukturo 2014-2020 kaj el ŝtata buĝeto. Dum modernigo estos renovigata relvoja surkonstruaĵo, modernigataj telekomunikadaj kaj sekurercinstalajoj, kontaktlineo kaj pasaĝerkajoj. En urba kvartalo *Strážov* aperos haltejo *Nová Žilina*.

Svisio: **Fervojlinio *Albulabahn* ricevos novajn pasaĝervagonojn**

Kvankam kontrakto por produkto de ses novaj vagonkombinaĵoj, markitaj kiel *Albula-Gliederzug AGZ*, kaj de vagonoj de tipo *Ait* inkluzive de kondukvagonoj estis subskribita inter Retia Fervojo kaj kompanio *Stadler* en decembro 2010, konceptajpreparoj de novaj vagonoj komenciĝis jam en februaro 2009. Dum ok intensaj laborkunsidoj kun partopreno de fakuloj el fervojaj sekcioj krom infrastrukturo aperis konstrua modelo de nova vagono, kaj en decembro 2009 post sepmonata laboro ĝi estis aprobata.

Tuta novaĵo fariĝos speciala fotokupeo por favoruloj de fervojo kaj alpa naturo kun grandaj panoramaj elektre ŝoveblaj fenestroj, kaj vico da laŭlonge lokitaj klapsidiloj en mezo de la vagono. En vagonaro estos kelkaj modernaj necesejoj kun fermita sistemo. Senobstakla tualetejo estos en kondukvagono. En vagonaro troviĝos ankaŭ kvaropo de laŭnormaj tualetejoj, kiuj estos dividitaj al porvirinaj kaj porviraj. En porviraj krome estos aranĝitaj urinejoj. Pli altan nivelon havas ankaŭ teknikaj parametroj kun multaj novigoj por montara etŝpura fervojo, ekzemple parte basplanka senobstakla solvo aŭ riĉe dimensiaj vagonvestibloj. Pordoj estas duklapaj kaj ĉe normigitaj vagonoj 1400 mm larĝaj, ĉe basplankaj pro solideco de la vagonkesto 1200 mm.

Svisio: **Koncepto de kombinitaj vagonoj**

Retia Fervojo en kazo de vagonkombinaĵo *AGZ* decidiĝis por koncepto de kombinitaj ses vagonoj, kiuj en regula trafiko daŭre estas kunligitaj. Ĝis nun estis uzataj vagonoj kun centra kuplilo tipa por etŝpura trafiko. Kiel kompletan el per artikoj kunligitaj vagonoj oni ĝis nun uzis nur la novajn elektrajn motorkombinaĵojn *ALLEGRA*. La senmotora vagonkombinaĵo *AGZ* ne estas ekipita per samspeca kondukvagono, sed normale estas trakciata de modernaj lokomotivoj tipo *Ge 4/4 III*, ĉian ĉe trajnkapo. Kompletan el netradicia artika kombinaĵo *AGZ* kuplita kun kondukvagono *Ait* komune estas 131 metroj longa kaj pezas sen pasaĝeroj 171 tunojn, kun pasaĝeroj eĉ 199 tunojn simile al lokomotiva-kondukvagona trajnkompleto *railjet*. Ĝia ĉefa avantaĝo estas evito de lokomotivmanovro en trajnfinaj stacioj. Danke al tio reduktiĝos restado en tiaj stacioj kaj plirapidiĝos retrovetura procedo de trajnkompletoj, kio ŝparos nombron da bezonataj vagonaroj kaj lokomotivoj. Kunpuŝiĝa rapido 15 km/h.

Preparis: **Jindřich Tomášek**  
Reviziis: **Heinz Hoffmann**

## Rava fabelo, tamen vera.

Oni iom malfide prenas en la manojn librojn pri la grandaj mondmilitoj. Estis ja tro multo skribita kaj filmita pri la du terureventoj, kaj pro negativaj spertoj oni ne ĉiufoje kredas la ne malofte fanfaronajn, tromp-memorajn rakontojn.

Iom kun similaj sentoj mi enmanigis la germanlingvan libron *Kriegsimpressionen*.



*Martin Stuppig*

Militaj impresoj de la vaste konata esperantisto Martin Stuppig, homo postvivinta la teruraĵojn de la batalejo de Monte Cassino en Italio. Ĉi tiun unuan impreson mian plifortigis la titolpaĝo, sur kiu videblas la junaĝa portreto de la aŭtoro en la uniformo de Wehrmacht, kun Egiptiaj piramidoj fone kaj atakanta trupo bildantaŭe.


Tamen miaj antaŭsentoj trompis min: mi povis demeti la libron nur ĉe la lasta paĝo 258! Prokrastataj iĝis urĝaj laboroj, promesitaj vizitoj, eĉ la tagmanĝo. Ja temas ne pri la kutimaj militaj memoraĵoj! Ne ja, s-ro Stuppig estas ja ne scienca aŭ literatura verkisto. Sed eble tiel estas pli bone, li ja intereskapte kaj -retene rakontas per siaj plej kutimaj vortoj; mi havis la senton, kvazaŭ li parolus al mi ĉeeste, en persona dialogo. Lia lingvaĵo estas tipe aŭstra, ĉiutagece vigla, li uzas multajn aŭstrismojn, kiel kutime en la vivo. Tio tamen estas neniel malavantaĝa, eĉ faras liajn eldirojn pli

aŭtentikaj. Malgraŭ ĉi tiu ĉiutageca stilo mi tamen ne dirus, ke li ne havas romanistan talenton, li ja revivigas kaj bildigas la tiutempajn personojn kaj okazintaĵojn per vera literaturista arto kaj lerto.


La subjekto dividiĝas en tri partojn. Kiel aŭstro li estas mobilizita en la germanan Wehrmacht, kaj venas al Monte Cassino, unu el la plej sangaj batalejoj de la dua mondmilito, kie li apenaŭ evitas la sorton de la plejmulto de siaj kamaradoj. Li vundiĝas kaj militkaptite longe kuraciĝas en lazareto. Poste li estas transportita en militkaptitejon en Egiptio. Kaj por mi ĉi tie, en la lazareto kaj militkaptitejo komenciĝas la plej interesa parto de la peripetioj de la juna soldato.

Por Martin gravas ja ne tiom la militaj operacioj, ĉi tiuj ĉeestas nur fone, sed plie la interpersonaj kontaktoj, la reagoj de la ĉirkaŭhomoj al certaj defioj kaj situacioj, homeca rilatiĝo al kaj de la malamikoj. Kio movas la homon, kaj en kiu direkto? En la priskribo de ĉi tiuj interrilatoj manifestiĝas la vera mesaĝo humana de la

libro: optimismo kaj memhelpa agemo en la solvado de la ĉiupaŝe prezentiĝantaj problemoj. Kiel la angla flegistino en la lazareto, Sister Ann diras: „Bewegung ist Leben”, movi sin estas vivi. Mi kredas, ke tio estis kaj estas la vivdevizo de s-ano



Martin, kiu pluhelpis lin dum lia longa ekzistado ĉi-tera tra ĉiuj stumbliloj kaj kaptiloj de la vivo. La unuapersona rakontanta protagonisto sagace eltrovas en ĉiuj ŝajne nesolveblaj situacioj la elirvojn, kaj konservas en ĉiuj cirkonstancoj sian homecan sintenon kaj indecon de sia persono. Liaj rimedoj por tio estas simplaj, esperi kaj agi. Inda programo ankaŭ por esperantistoj, kio destinas la libron esti legata ankaŭ de la negerman-lingva samideanaro. Kiel mi estas informita, lertapluma aŭtoro jam entreprenis ĝian translingvigon.



Malfacile mi difinus la ĝenron de ĉi tiu libro: ĝi estas iaspeca membiografio, ja temas pri la personaj rememoroj de la aŭtoro kun preciza indiko de lokoj, personoj, organizoj, armeopartoj, eventoj kaj cirkonstancoj, tamen mi ne asertus, ke ĝi ne estas romano, la protagonistoj agas ja kiel en romanoj, la etoso estas daŭre streĉa kaj atentokapta, la sinsekvo de la eventoj logike ĉenita kaj spirhaltiga. En tiel longa tempoperspektivo de ĉ. sesdek jaroj detaletoj, konversacioj, ĉiutagaĵoj kompreneble apenaŭ rememoreblas precize, kvankam vivogravaj eventoj certe povas fikse engravuriĝi en la memoro. S-ro Stuppnig elektis brilan kaj unusole taŭgan metodon: li plektis el la restintaj memoreroj rave interesan teksaĵon, kompletigante la memorhatojn per romaneca fabelado. Kio signifas, ke probable ne ĉio okazis tiel, kiel priskribite, tamen estus povinta okazi tiel. Kiel en romanoj... Kaj tio faras la legavidon nehaltigebla. Tre simpatia estas por mi la

filozofio de la aŭtoro: li prenas ĉiufoje la cirkonstancojn donitaj, kaj agordas sian farmanieron laŭ tio, „nekuraceble” esperas kaj fidus ĉiufoje pri ia solvo, elirvojo, kaj trovinte ĝin li ne preterlasas agi. Lia senĉesa optimismo interalie malfermas liajn okulojn al la belaĵoj, bonaĵoj, valoroj de nia vivo. Bela manifestiĝo de tio en la libro estas ekzemple, ke li riskas forlasi la internigejon, nur por propraokule vidi la piramidojn. Li trovas tiujn punktojn de eblaj kontaktoj kun siaj kaptintoj, kamaradoj kaj la loka loĝantaro, laŭ kiuj ili povas kunlabori kaj kunvivi solidare kaj utile por ĉiuj. Do li kapablas trovi la komunan lingvon – laŭ la revo de Zamenhof...

La libron kompletigas kelkaj fotoj kaj la konfeso de la aŭtoro, ke li bezonis sufiĉan distancon disde la eventoj, por – liberiĝinte de la tre kompreneblaj inkubsonĝoj – povi pli objektive vidi la okazintaĵojn. La volumo estas ekstere plaĉe formita, tamen kun kelkaj iam elsarkindaj ortografiaj kaj ĉefe interpunkciaj mankoj interne. Mi rekomendas la libron kun la propraj vortoj de la aŭtoro el la Prologo de lia verko: [meine Kriegsimpresionen] mögen das „Friedensbewusstsein meiner Nachfahren stärken”, do ke [miaj militaj impresoj] plifortigu la packonscion de miaj posteuloj!

**József Horváth**

*La Esperanto-verzio de la libro – kun la titolo „Home sen homeco” – estas preta je la traduko de József Horváth, membro de nia asocio, kaj aperos okaze de la maja germana E-kongreso, en la prizorgo de la eldonejo Kava-Pech.*

**La red.**

## Rememoro pri morto de Kalocsay

La 27-an de februaro 2016 en naskiĝurbo de Kalocsay, en *Abaújszántó* okazis kunveno kies partoprenantoj rememoris pri la 40-jara datreveno de morto de D-ro Kolomano Kalocsay. La kunvenon aranĝis la urba kulturdomo, kies direktorino estas *Andrea Gyöngyösi*. El urboj *Abaújszántó* kaj *Miskolc* ĉeestis ĉirkaŭ 20 personoj. La urban konsilantaron reprezentis *D-ro Ernő Ottó Lerch* notario. Loko de la festa rememoro estis la urba Lokhistoria Muzeo, en kiu troviĝas ankaŭ memorĉambro de Kalocsay.



*Florkronas la statuton D-ro József Halász*

Konstruaĵon de la muzeo en la proksima pasinteco oni renovigis. Mem la konstruaĵo de la muzeo beliĝis, tamen kun bedaŭro ni spertis, ke oni elhakis tiun pingloarbon, kiun plantis partoprenantoj de la 68-a UK en 1983. La arbo tre bele kreskiĝis, estis tro proksime al la domo kaj malhelpis la renovigajn laborojn. Estas domaĝe pro ĝi.

Post salutvortoj de la kulturdoma direktorino *Adrienn Pásztor* rememoris pri vivo kaj agado de

Kalocsay. Ŝi laŭtleĝis leteron de s-ro *Kristoph Klawe* prezidanto de UMEA el la germania abateja sed samtempe same vinregiona urbeto *Trier*, kaj tiujn de la hungara verkisto *István Nemere* kaj de la itala *Giorgio Silfer* vivanta en Svislando. Ŝi menciis la salutojn alvenintajn de geesperantistoj inter ili tiun de *Veronika Poor* de CO de UEA.

Post la kunveno la ĉeestantoj vizitis la statuon de Kalocsay kaj florkronis ĝin. Metis florkronojn je la nomo de la naskiĝurbo *D-ro Ernő Ottó Lerch* urba notario, el Esperanto-grupo „*Király Lajos*” el urbo *Miskolc* *László Pásztor*, kaj je la nomo de *Miškolca* Societo de Fervojistaj Esperantistoj *D-ro József Halász*.

La kunveno finiĝis ĉe la memortabulo de Kalocsay, kie metis florkronon, kaj eklumigis meĉujon *László Pásztor*.

Estas laŭdinde, ke la naskiĝurbo de Kalocsay rememoris pri sia eminenta kaj – certe sen troigo ni povas diri – mondfama filo, kaj konservas, flegas lian memoron.

Estus tre bone, se ĉi tiu urbeto iĝus Mekko de la esperantistoj.



*Partoprenantoj antaŭ la memortabulo*

**D-ro József Halász**

## Zamenhof-memorifesto en *Nyíregyháza*

Multjara tradicio estas, ke la „Verda Stelo” Esperanto-grupo en *Nyíregyháza* aranĝas Zamenhof-memorifeston. Ankaŭ ĉi-jare okazis tiel. La 5-an de decembro membroj de la grupo kaj la alvenintaj gastoj renkontiĝis en la loka fervojista kulturdomo. La gastoj venis el *Debrecen* kaj *Miskolc*. Estis ankaŭ eksterlandaj gastoj, tri virinoj alvenis el la najbara Rumanio el urbo *Baia Mare* (hungara nomo: *Nagybánya*).



*Miklós Zuberecz*, prezidanto de la grupo salutis la ĉeestantojn, kaj mal-longe li rememoris pri la vivo kaj agado de Zamenhof. Poste li resumis plej gravajn eventojn, kiuj okazis en la vivo de la grupo dum la pasinta jaro. La membroj estis aktivaj, ili partoprenis diversajn Esperanto-aranĝaĵojn. Kvar personoj estis en Tata, okaze de la Landa Amika Fervojista

Esperanto-Renkontiĝo. Same tiel kvar personoj vojaĝis en Lillon al la jubilea kongreso de UEA. La grupo akceptis eksterlandajn gastojn el Usono kaj el Koreio. En septembro pasis tri tagojn en *Nyíregyháza* s-ro *Radojica Petrovic* reprezentanto de ILEI, ekkoni la lokon de la venontjara ILEI-konferenco. Atestas aktivecon de la grupo, ke ili organizis iun programon en ĉiu monato, kaj siaj kunvenoj okazis ĉiun mardon. Sekve la mallongan raporton *Győző Gál* deklamis poemon de *Nadija Hordienko Adrianove*, titolitan Esperanto. Poste la ĉeestantoj povis aŭdi mallongajn raportojn de *Asztalosné Györgyi Koltay* kaj *Győző Gál* pri kongresaj travivaĵoj, akirintaj en Lillo okaze de la 100-a UK. Sekve ilin *Sereghyné Enikő Zengő* rakontis pri siaj vizito, travivaĵoj kaj spertoj en Koreio.

Grava evento estis en vivo de la grupo sukcesa pretigo de nova statuto, kiun la kompetenta tribunalo registris. Tiel la grupo akiris novan juran formon, transformiĝis societon. Ni gratulas kaj deziras sukcesan agadon al la nova societo. Ilia nomo en la estonto estas „Verda Stelo” Esperanto-Societo. En la fina parto de la programo la partoprenantoj ricevis informojn pri preparaj laboroj de la 2016-jara ILEI-konferenco, kies loko estos *Nyíregyháza*, kaj kies organizanto estas la nova societo.

La gastoj alvenintaj el Rumanio salutis la partoprenantojn, kaj invitis ilin al Ekumenaj Bibliaj Tagoj 2016. La aranĝaĵo okazos de la 6-a ĝis la 10-a de aprilo 2016 en urbo *Baia Mare*. Ili konigis la plej gravajn informojn, kaj transdonis aliĝilojn. Je la nomo de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio D-ro *József Halász* salutis la ĉeestantojn, kaj deziris multe da sukceso, por la estonta agado, precipe plenumi entreprenitajn taskojn de ILEI-konferenco. Post la oficiala parto de la aranĝaĵo okazis libera babilado, kaj kantado de konataj Esperanto-kantoj.

**D-ro József Halász**



## Nostalgia trajno en Hungario



La 68-a kongreso de IFEF okazos de la 21-a ĝis la 28-a de majo 2016 en Bulgario en la urbo Varna.

Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.